

Ludwig Lazarus Zamenhof,
La vojo

Ludwig Lazarus Zamenhof,
Auf sicherer Bahn

tradukita de Theodor Fuchs

Freie Übersetzung des Zamenhofschen esperantistischen Trutzliedes "La Vojo", der Esperantistischen Jugend gewidmet

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek mokoj de
l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' difinita.

Es schimmert ein Licht durch Dunkel und Nacht,
Wir ziehn ihm vertrauend entgegen.
Wie nächtlich am Himmel der Sterne Pracht
Uns leitet auf richtigen Wegen.
Uns schreckt nicht der Gespenster Gedränge,
Nicht Schläge des Schicksals, der Spott nicht der Men-
ge,
Denn hell und klar auf sicherer Bahn,
Zieht uns verheißend der Stern voran.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro
Atingon la celon en gloro.

Ohn' Wanken und Schwanken nur immer voran,
Vor uns liegt klar die erkorene Bahn.
Der fallende Tropfen, so schwach, so klein,
Er höhlet den Felsen, durchbohrt das Gestein.
Wo Glaube und Liebe und Hoffnung blühen,
Da stehen auch unsere Zeichen.
In ihrem Schutze nach heißen Müh'n,
Das Ziel wir einst jubelnd erreichen.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas
-
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas -
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas -
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos!"

Wir streuen den Samen ohn' Unterlaß,
Gedenkend der kommenden Zeiten.
Manch Same verdorrt, manch Same verweht,
Wir neue Saaten bereiten.
"Laßt ab", ruft die Menge, "Euch blüht kein Glück",
"Steht fest", so tönt es im Chore zurück.
Weicht nimmer dem Spotte, weicht nimmer dem
Drohn,
Euch winkt in der Zukunft ein herrlicher Lohn.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantaj foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam via bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Die welkdenden Blätter, wom Sturme verweht,
Sie wirbeln auf nieder.
Der Sturm erfrischt und reinigt die Luft,
Gibt frische Kräfte uns wieder.
Unsere brave Mannschaft wanket nicht,
Es sind gar wackere Streiter,
Erprobt und gehärtet im heißen Kampf,
Ziehn ruhig des Weges sie weiter.

...

...

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
 Ni iru la vojon celitan!
 Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
 Traboras la monton granitan.
 L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
 Jen estas la signoj, per kies potenco
 Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro
 Atingon la celon en gloro.

Es bricht durch das Dunkel ein helles Licht,
 Es strahlt uns verheißend entgegen.
 Wir bangen und wanken und schwanken nicht,
 Hell wird es auf all unseren Wegen.
 Uns schrecket der Hohn nicht, uns schreckt nicht der
 Spott,
 Was immer die Menge auch triebe.
 Mit uns ist die Hoffnung, mit uns ist Gott,
 Mit uns ist die ewige Liebe.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas
 LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko
 Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-
 14).*

*Traduko de la Esperanta poemo "La vojo" de LUDWIG LA-
 ZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-
 15 - †1917-04-14) en la Germanan de THEODOR FUCHS
 (*1842-09-15 - †1925-10-05).*

Arg-969-1950 (2014-03-01 10:57:16)

Arg-969-1951 (2014-02-13 23:48:49)

*Tiu ĉi poem-germanigo aperis en 1911 ĉe A. Schönfeld, I.
 Universitätsstr. 8, Vieno, Aŭstrujo. Pri la tradukinto vidu
 la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/
 Theodor_Fuchs](http://de.wikipedia.org/wiki/Theodor_Fuchs) aŭ [http://eo.wikipedia.org/wiki/
 Theodor_Fuchs](http://eo.wikipedia.org/wiki/Theodor_Fuchs).*